

per la kolektita mono kaj helpe de la tiama prezidento de Tanzanio d-ro *Julius Nyerere* ŝanĝi la naciparkajn limojn tiel, ke la sovaĝbestoj povas migradi laŭ siaj heredaj vojoj, kiuj ĝis hodiaŭ havas la saman praan formon kiel en antikvecaj epokoj. Tamen, mi denove devas atentigi, ke tiom nedifektite kiom tiu ĉi sovaĝeja bestomondo aspektas, ĝi tute ne estas. La turismo – iama beno – fariĝis malbeno. Ĉiun jaron proksimume 120 000 turistoj vizitas Serengetion. Sed veran vizitan “sovaĝegan travivaĵon” dum la nuna amaturismo la turistoj mem detruas. Kiam la *Michael-Grzimek*-Memorlaboratorio iĝis en la komenca fazo, la Parko troviĝis – pro la tre malbona ekonomia situacio de Tanzanio – en ĥaosa kondiĉo. Ŝtelĉasado estis sur la tagordo (vd. bildojn en p. 225 kaj p. 226), la parkgardistoj preskaŭ ne deĵoris, dum jaroj ekskluzive nur gravis protekti la parklimojn (kiuj ja konsistas nek el dratreto barilo, nek el ŝtona muro, nek el profunda foso) kontraŭ senpermesa eniro.

Hodiaŭtempe ne plu sufiĉas por tiuspeca Nacia Parko iu klasika, tamen eksmoda naturprotektado. La granda vizitantonombro, la mondvasta klimatoŝanĝiĝo, la malsanoj transigeblaj de hejmaj al sovaĝaj bestoj estas la plej gravaj problemoj. Sed speciale pezas la kreskanta indiĝenloĝantaro premo, ĉar la farmoj kaj kultivejoj de la leĝaj kaj neleĝaj homoj sufoke ĉirkaŭkroĉas la Parkon (vd. la sciencelaĵon “Pri la malapero de sovaĝbestoj en safariparko” en p. 250).

La malkontento pli kaj pli altiĝas, kiam leonoj mortigas laktodonajn bovinojn kaj elefantoj detruas maiz-kampojn kaj formanĝas fruktrikoltojn bezonatajn por vivteni la propran familion. Per kelkaj portretoj kaj mallongaj temoj mi volas doni enrigardon en la mondon de la Gĵimekaj heredantoj kaj vekti la intereson de la SR-legantoj pri la sensostreĉaj kaj ekscitaj historioj, malantaŭ kiuj kuŝas ofte la vorto “naturprotektado”, ĉar Serengetio nuntempe estas antaŭ novaj provokoj: turismo, bestomalsanoj, hejmbestaj/sovaĝbestaj konfliktoj, populaci-premo, klimatoŝanĝo.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Rüdiger SACHS

Vor dem Brückentor 3

DE – 37269 – Eschwege / Germanio

<isaesachs@aol.com>

Priaŭtora informo

Doktoro de veterinarmedicino. Profesoro pri parazitologio. Iama sciencakunlaboranto de prof. *Grzimek*.

Kiom ofte vi pasintjare vizitis koncerton?

Wolfdietrich KÜHME

En 1962 mi sidis kun mia edzino en la ĉefa buroo de la Zoologia Ĝardeno en Frankfurto antaŭ prof. *Bernhard Grzimek* kaj s-ro *John Owen*, direktoro de la Tanzaniaj Naciaj Parkoj. La eminentuloj petis klarigon, laŭ kiuj cirkonstancoj mi pretus iri al Orientafriko por fari “esploron pri leonoj”. La spertuloj kredis, ke troviĝas en Serengetio aŭ tro multaj aŭ tro malmultaj de la speco “reĝo de la bestoj”.

Ĉu la aludo al koncert-ofteco estis foscaptulo, insida demando? Ĉu tiel eltrovi, ĉu kandidato kapablas malligi sin de karaj civilizaciaj kutimoj, ĉu li taŭgas por riska engaĝiĝo en sovaĝeja soleco? Nu, esti metata kun la edzino kaj bebo kelkajn jarojn en “centron de nenio” estas vere troa postulo. Kion fari se iu malsaniĝos? Tiu demando ne estas signo de malkuraĝo. Serengetio ja surfacas 14 763 km² (t.e. preskaŭ la duono de Belgujo kun 30 513 km²), kaj la Nacia Parko mem estas protekte ĉirkaŭata de aliaj kontrol- kaj konservadaĵoj (Bildo 1), en kiuj ne loĝas eŭropaj setluloj. La turisma centro de Serengetio, *Seronera*, estas 317 km for de *Arusha*, kie troviĝas la nacia-parka administrejo. La plej proksima hospitalo do tiom multkilometre distancas, ke eĉ malgrava malsano kiel apendicito iĝus mortiga. Samdistance ankaŭ la lernejo, la vendejo por aĉeti “ĉiutagajn” mastrumilaĵojn, la plej proksima “civilizacia” kafejo...

De tempo al tempo prof. Gĵimek’ donis telefonan vivosignon: “Kio pri la antaŭpreparo”? Mi ankoraŭ ne estis vere enveninta en la rondon ĉirkaŭ Gĵimek’, kaj nur vidis lin la unuan fojon dum la pridunga interparolo. Miaj kolegoj ĉe Maksplank-Instituto por Etologia Fiziologio en la bavara *Seewiesen* eĉ malpli konis lin. “Zoodirektoro ne estas kutimaĵo en nia esplorinstituto kaj same ne labori en zoologia ĝardeno”, grumblis prof. *Konrad Lorenz*, nia fama direktoro. Tute ne-scienca estis la dua renkontiĝo kun Gĵimek’. Li iam estis malferminta la pordon de mia laboratorio kaj aldoninta al miaj zorgoj flegitaj buŝkovaj “batalfiŝoj” iujn fremdajn akvovivaĵojn kunprenitajn el okcidenta Afriko. Hororo, kiom rapide povas finiĝi esplorprojekto!

En novembro 1963 mi alvenis en Serengetion. Iu naciaparka oficisto asignis al mi “la plej bonan rondan barakon” en *Seronera* – almenaŭ ĝis venos la kristnaska turistolavango. Mi do fuĝis de tiuspeca “civilizacio” same kiel miaj kolegoj, kiuj jam antaŭe transloĝiĝis al *Banagi*, kelkajn kilometrojn nordokcidente de la turisma amascentro. La homo, kiu okupiĝis pri zebroj, vivis kun sia edzino en domo kun metrodikaj muroj el ŝtondefalaĵoj, verŝajne restaĵo de iama antaŭposteno el la german-okcidentafrika koloni-trupa epoko. La veterinaro kun siaj edzino kaj infanoj uzis lignan barakon kiel loĝejon, same kiel ties projekt-dungita ĉasisto (tanzani-naskiĝinta filo de profesia ĉasistino), kiu parolis la svahilan kvazaŭ kiel indiĝeno kaj estis vera metiista ĉiopovulo. Sed jam baldaŭ la bestkuracista teamo devis ŝanĝi sian loĝejon al *Kirawira*, 100 km plu okcidenten (Bildo 1), kie ili vivis en 8-angulaj ladkabanoj de kvinmetra diametro. La projekt-celo inkluzivis la ĉasadon de antilopoj por veterinara ekzamenado. Sed naciaparkaj reguloj ne permesas mortpafadon en Nacia Parko; tio nur eblas en ĉas-permesa “kontrol-areo”.

Miaj supozoj pri natura ekvilibro inter plantomanĝantoj kaj karnovoroj ne ŝanĝiĝis post kelktempa observado de la preskaŭ tuttage dormantaj leonopopulacioj – kiuj tamen malfruvespere kaj frumatene montras enorman predokaptan aktivecon. Multe pli interesaj ol la animalregna reĝo estis la hienohundoj (*Lycaon pictus*, esperantlingve eble “likaonoj”) kies socia strukturo kaj kondutbiologio fascinis min



kaj estis bazo de sciencaj publikigaĵoj. Mi observis ok masklojn kaj du femalojn (evidente tute egalrajtajn) prepari sin por ĉasado (forme de ĉasgrupo) antaŭ siaj subteraj loĝkavoj en la serengetia

stepo. Kiu venis tro malfrue, tiu devis resti hejme kaj zorgi pri la junularo. Post la ĉasado, la ‘ĉasistoj’ elvomis englutitajn viandopecojn por nutri la idojn kaj la hejme restintajn plenkreskulojn. Ili dufoje ĉasis, matene kaj dumvespere. Tion ĉion mi volis raporti al Gjimeko (tria renkontiĝo), por peti fakulajn sugestojn. Sed la granda majstro neniam okupiĝis pri detaloj. Li estis la rekta kontraŭo de mi, kiu interesiĝis pri la individuo, pri la grupo, pri la specio.

Iun belan tagon (kvara renkontiĝo kun Gjimek) mia ĉiuteren landrovero staris meze en la stepo apud hienhunda hejm-kavo, bone videbla de ĉiuj flankoj. Tial sufiĉe ofte iuj vizitant-aŭtomobiloj (nekompreneble, ke sukceso de etologia observado dependas de plejeble

strikta silento kaj senmoviĝo por ne perturbi la bestojn) forlasis la ĉefvojon, supozante, ke mi observas leonojn. Unu el tiuj ĝenantoj estis bruofrape klakanta VW-busaĉo kiun stiris prof. Gjimek, kiu demandis: “Ĉu io ne en ordo pri via aŭtomobilo?” Kiom ofte mi estis



Bildo 1: La Serengeti-ekosistemo konsistas el la Nacia Parko mem, protekte ĉirkaŭata de diversaj natur- kaj bestokonservadaj areoj:

1. Nacia Parko “Serengetio” (*Serengeti National Park*)
2. Rezervejo Masaj-Mara (*Maasai-Mara Game Reserve*)
3. Kontrol-areo ĉirkaŭ Loliondo (*Loliondo Controlled Area*)
4. Konservada areo ĉirkaŭ la kratero Ngorongoro (*Ngorongoro Conservation Area*)
5. Rezervejo de la Maswa-regiono (*Maswa Game Reserve*)
6. Kontrol-areo norde de la rivero Grumeti (*Grumeti Controlled Area*)
7. Kontrol-areo de la Ikorongo-areo (*Ikorongo Controlled Area*)

La diferenco inter sovaĝbestaj naturrezervejoj en Afriko estas, ke en Nacia Parko (1) ne estas permesata (escepte konstruado de turismaj vojoj) eĉ nur malgranda ŝanĝo de la biotopo, kaj regas strikta malpermeso de ĉasado aŭ forkaptado de sovaĝaj animaloj. En la sovaĝbestaj “Rezervejoj” (2 kaj 5) kaj la “Ŝtate Kontrolataj areoj” (3, 6 kaj 7) la naturo estas strikte konservata kaj ĉasado nur laŭlicence permesata por pagopovaj lokaj kaj eksterlandaj ĉasistoj, sub gvido de loka(j) gvidanto(j). “Konservada areo” (4) permesas – krom strikta protekto de la sovaĝbestoj – loĝadon kaj limigitan agrikulturan aktivadon de la indiĝenaj masaj-tribanoj kun siaj hejmbestoj.

aŭdinta tiun demandon pri ebla aŭtomobil-difekto! Kaj tion de eminenta Gĵimek'! Li tamen tuj rimarkis, ke mi nek dormas nek volas esti ĝenata en miaj prihienohundaj observadoj – kaj forveturis.

La kvina renkontiĝo: iam mi stimulis lin kaj lian bofilinon fari mal-longdaŭran ekskurson. Ĉe malgranda ŝtonkovrita altaĵo mia land-rovero ne plu funkciis: la startilo ŝajne suferis pro antaŭa nememvola “banado” dum transiro de rivera vadejo akvo(tro)plena. La starigo sur altaĵo estis bonŝanĉa, ĉar de tio eblas ruli la vehiklon post malstreĉa puŝado. “S-ro Gĵimek’: Vi stiru, ni puŝu!” mi sugestis. Sed tion li ne volis. Li petis min, ke mi sidiĝu malantaŭ la stirilo – kaj la fama tele-vidprofesoro kun sia bofilino ambaŭ puŝis. Sukcese puŝis.

La sesan fojon ni renkontiĝis antaŭ la “Nova Aruŝa Hotelo” en *Arusha* mem. Gĵimeko ne portis kravaton. Pro tio oni ne permesis al li, eniri la hotelan restoracion. (Tiom striktaj estis la reguloj en iama brita kolonio!). Mi ne plu memoras, kial mi hazarde kunhavis du kravatojn. Ĉiuokaze mi pruntedonis kravaton al li (kaj plue donacis al li masajajn batalŝildon kaj ĵetlancon). Dum posta diskuto mi menciis, ke mi tute ne kontraŭus – ja eĉ bonvenigus – ke masajotribanoj paŝtu siajn gregojn en Serengetio mem; ili ja iel estas parto de la Naturparko. Gĵimeko havis tute alian opinion. Nu, mi nuntempe ĝojas, kiam mi almenaŭ en la Ngorongoro-rezervejo vidas, ke masajoj rajtas konduki tien siajn hejmbestojn por trinki ilin.

Mi bone interrilatis kun Gĵimeko dum tiu ĉi tempo en Tanzanio, en Serengetio. Li tiam estis pli kolego ol ĉefo. La antaŭlastan fojon mi renkontis lin kiel “veran ĉefon” inter siaj dungitoj kaj bestoflegantoj en la Frankfurta Zooparko. Oni festis iun feston. Mi volis atentigi pri iu problemo en la naturprotektata regiono por la formortantaj *Atlas*-montaraj cervoj, sed ne ricevis aljuĝon. Gĵimek’ havis aliajn interesojn. La lastan fojon ni hazarde renkontiĝis en la zoologia ĝardeno en Kolonjo. Neniu zorgis aŭ interesiĝis pri la famulo. Li staris sola antaŭ la fazanejo. Mi atente alproksimiĝis. Sed li volis “nur rigardi”. Tial ni, post nur mallonga tempo, adiaŭis. Por ĉiam.

Adreso de la aŭtoro

Dr. Wolfdietrich Kühme

Richter Gürtel 1

DE – 50735 – Köln / Germanio

Priaŭtoro informo

Zoologo. Scienca laboro ĉe Maksplankinstituto en Bavario/Germanio, 1963/64 en Serengetio, poste ĉe Zoologia Ĝardeno en *Köln*, Germanio.

La homo kaj Naciaj Parkoj

Hans-Friedemann SACHS

Enkonduko

Neniam ekzistis tiom multaj Naciaj Parkoj kiom nuntempe, neniam ili estis tiom necesaj kaj neniam antaŭe ili montris tiom grandajn nombrojn da vizitantoj. Tio precipe validas por Afriko. Naciaj Parkoj kaj similaj formoj de natur- kaj sovaĝbesta protektado evidente estas de grava signifo. Tiajn cirkonstancojn konsideras tiu ĉi artikolo por la “klasikaj regionoj de naciaj parkoj”, nome Orienta Afriko. Tie oni ekkonis la gravecon de la instalado de naciaj parkoj en nia hodiaŭa vivoepoko. Ankaŭ la evoluigaj metodoj de naturprotektado, la sukcesa funkciigo de Naciaj Parkoj ne devas ĉesi – sed devas sin aranĝi kaj akordiĝi, vole aŭ nevole, al novaj faktoj, bedaŭrinde ne nur al biologiaj. Se en antaŭaj tempoj la idealo de nacia parko estis vidata en la absoluta netuŝateco de ia regiono kaj rigora protektado, la hodiaŭa protekta taktiko baziĝas sur realismaj kompromisoj.

La kreado de Naciaj Parkoj esence rezultas el la sento de respondecado konservi la restojn de iam multnombra kaj unika sovaĝbestaro por estontaj generacioj. Tio ne eblas per alta muro aŭ profunda foso ĉirkaŭ konvena sovaĝej-regiono por efika ŝirmado kontraŭ malbonaj kaj malutilaj influoj de ekstere. Tia statika koncepto cedis al dinamika koncepto – antaŭ ĉio pro la ekkono, ke ankaŭ Naciaj Parkoj kostas monon. Multege da mono.

Kontraŭ la ŝtelĉasistoj ekzemple oni povas batali nur per efika kontrolado helpe de bone ekipita kaj bone edukita gardisto-trupo. Edukado kaj ekipaĵo kostas. Celkonforma bestoprotektado en pli vasta senco povas ekzisti nur per preciza kono de la sovaĝbestaj populacioj – do, pere de intensa esplorado. Ambaŭ aktivadoj kostas monon. La plej granda malamika sinteno tamen estas la senintereso kaj indiferenteco de multaj homoj kontraŭ la ekzistado kaj graveco de la pluekzistado de la naturo kaj la bestaj kunvivuloj. Tial oni devas varbi por la ideo de ŝirmado de la naturaj faŭno kaj flaŭro. Oni devas fari